

& La stranga aventuro de Grafo Dormanski:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 595 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino".>

(#Melodio:

<:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La La a;)

)×17)+

(&Strofoj:

'1 /En Rusujo bolŝevika, ; Dum la ŝtatrevolucio, ; Oni aŭdis pri unika ; Fakto de la Historio.

(×:; **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.**)

'2 Bolŝevikoj sangavidaj, ; Filoj de blindiga ruĝo, ; Estis tre rapiddecidaj ; Ĉe kondamna pun-aljuĝo.

'3 Ili buĉis sen kompatato ; – Pro Justec' revolucia – ; Ĉiun viron en la ŝtato, ; Kiu estis senmetia.

'4 Ili al la tribunaloj ; Ĉiutage iun trenis, ; Kies manoj, ĉar sen kaloj, ; Dum labor' neniam penis.

'5 Se ĉi tiu ne sukcesis ; Esti ruza advokato, ; Lian kazon fin-procesis ; Senkapiga sabrobato.

'6 Vivis tiam en kastelo ; Graf' Dormanski, parazito, ; Kies sola vivocelo ; Ŝajnis, "kuŝi en la lito" –

'7 Kaj ĝin sciis la urbanoj, ; Ke li senlabora estis; Ĉu mirige? Policanoj ; Iun tagon linarestis!

'8 Kaj la Grafo senprudenta ; Antaŭ Tribunalo staris, ; Dum kozako kompetenta ; Sian sabron jam preparis.

'9 Nia Grafo krokodile ; En poŝtukon multe ploris, ; Sed subite, fulmobrile ; Sava penso lin traboris!

'10 Tuj li petis, esperplena, ; De l' juĝeja prezidanto, ; Ke l' procedo ekzamena ; Estu nur en Esperanto.

'11 La juĝistoj dolĉanime ; Cedis al ĉi tiu peto; En mondlingvo bonesprime ; Komenciĝis la enketo:

'12 "Graf' Dormanski, la akuzo ; Diras, ke vi sen merito ; Vian vivon post amuzo ; Nun pasigas en la lito; –

'13 Ĉu vi montros argumente, ; Ke ĝi estas hom-metio?" ; Kaj li diris: "Evidente ; Tio estas profesio!

'14 Se mi vivas en la lito, ; Tio pruvas kun bontrafo, ; Kun logiko kaj kun sprito, ; Ke mi estas... *litografo!*"

'15 Kaj ĉi tiu ŝercdeklaro ; Tre sukcese lin defendis, ; Ĉar ridanta juĝistaro ; Lin gratule hejmensendis... ..

'16 Sed nun sekvas Epilogo ; Al ĉi tiu mira kanto: ; Nia Grafo filologo ; Turnis sin de Esperanto!

'17 Li konvertis sin al Ido, ; Kiu estas pli scienca, ; Ĉar... "neniu koincido ; Faras vorton dubosenca!!"